

LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 160, 2019: 6



Aparecida Araújo:
Esperanto-
Kongreso de
Lahtio en
Finlando



Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!




Titolo: Postmortaj rememoroj de Brás Cubas
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 248 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00



Titolo: Esav kaj Jakob
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 272 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00



Titolo: Dom Casmurro
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 260 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00

LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 160, 2019: 6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj
Ĉefkovrila fotografaĵo el 104-a Universala Kongreso en Lahtio (Finnlando)*

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2019

Simpla membro.....R\$ 150,00.

Subtena membro.....R\$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

merkrede: 15h - 17h; jaŭde kaj

vendrede: 13h - 17h; sabate: 9h - 12h

(escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la

dejoro daŭras de la 9h ĝis la 18h)

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins Coelho

Vicprezidanto: Marcos Zlotovich

1-a Sekretarino: Anna Lobo de Carvalho

2-a Sekretarino: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: José Roberto Tenório

2-a Kasistino: Neide Aparecida de Freitas

Propaganda Direktorino: Cristina C. de Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo Branco kaj

Aparecida de Souza Araújo

Anstataŭantoj

José Mauro Progiantje kaj José Martins Coelho

ENHAVO

LA
Lampiro

11

Leonardo da Vinĉi –
500 Jaroj de la
Arketipo de la
Renesanco

17

Disciplino estas
Libereco

5

Vortoj de La
Prezidanto

13

Unuiĝintaj Nacioj kaj
Ni, Esperantistoj

19

El La Vivo de
Fajrobrigadisto

6

Vortoj de la
Redaktoro

14

Esperanto kaj
teozofio

21

Recenzo: Blua
Sonĝo en
Antverpeno

9

La Tulipoj

16

Principo de
Necerteco

22

Lingvaj respondoj



Vortoj de la prezidanto

Jen alvenis la lasta monato de 2019.

Mi devas adiaŭi vin kiel prezidanto de nia kara EASP. Ĉi tiu finiĝanta mandato ne estas taksebla kiel plej fekunda kaj fruktodona, tion mi bone konscias. Mi ŝatus plenumi multe pli kontentige la celojn de nia asocio dum ĉi tiu periodo, sed mi pensas, ke niaj asocioj komprenas la malfacilaĵojn, kiujn ĝi alfrontas. Nia lando troviĝas en ekonomia krizo, niaj enspezoj pro tio (interalie) estas modestaj, niaj homfortoj eĉ pli malmultaj. Malgraŭ tio, nia sidejo kaj kursoj regule okazis, niaj kulturkunsidoj ĉiumonate arigas en la sidejo interesitojn kaj nia revuo regule aperis. (Fakte ni ŝatus aperigi ankaŭ paperan eldonon de “La Lampiro”, sed nia financa situacio tion ne permesis.) Ni eldonis novajn librojn kaj informaj kurieroj dissendiĝis per interreto. Precipe ni fieras pri la kvalito kaj partoprenado en niaj ĉiujaraj ŝtataj kongresoj kaj pri la regula funkciado de nia butiko.

Al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj helpis, ke niaj agadoj daŭre okazis dum ĉi tiu lasta mandato, mi deziras esprimi plej korajn kaj varmajn dankojn.

Ĝis la momento, kiam mi redaktas ĉi tiujn “vortojn”, ankoraŭ neniu kandidatiĝis por la proksima mandato. Mi tamen estas certa, ke bona prezidanto baldaŭ aperos kaj mi aŭguras bonegan laboron por la proksima estrar-periodo.

Kaj al ĉiuj membroj mi deziras Feliĉan Novjaron!



Vortoj de la redaktoro

Jen antaŭ vi, kara leganto, la lasta numero de nia kara revuo, en 2019. Mi ne povas eviti senton de kontenteco, ke ni plu digne aperas antaŭ vi, konservante la intencitan ritmon de ses numeroj en ĉiu jaro. Same, mi ne povas eviti senton de malkontenteco, ke denove ne eblas aperigi paperan eldonon de la tuta 2019-kolekto, kiel okazis en antaŭaj jaroj. (De tempo al tempo venas al mi en la kapon la ideo, ke eble ni povus trovi grupeton de malavaraĵ samideanoj pretaj konsistigi fonduson por ĉi tiu celo. Sed ni lasu ĉi tiun ideon por estonta konsidero.) Pri la enhavo de nia revuo, mi ankoraŭ atendas la opinion de legantoj. Fakte, la silento, kiu sekvas la lanĉon de ĉiu numero iom maltrankviligas min. Se vi ne reagis, mi ne povas scii, kiel plibonigi nian revuon, kiu finfine celas vin mem.

Mi devas kore danki al ĉiuj verkemuloj, kiuj bonvoleme kontribuis al nia Lampiro dum 2019. Kaj samtempe inviti tiujn, kiuj ankoraŭ ne faris tion, ke ili venu al ni kun siaj tekstoj, ideoj, proponoj, kritikoj. Apartan dankon mi ŝuldas al samideanoj José Roberto Tenório (revizianto) kaj Cristóvão Rocha kaj Sagad Dashti (grafikistoj), sen kiuj La Lampiro ne flagrus en 2019.

Al ĉiuj legantoj mi deziras prosperan, feliĉan Jaron 2020!

104-a Universala Kongreso de Esperanto

APARECIDA ARAÚJO

La ĉi-jara Universala Kongreso Lokazis en Julio, en la urbo Lahtio (Finnlando). Partoprenis 917 homoj, el sesdek landoj, inter ili kvardek kvar brazilanoj.

FINNLANDO situas en la norda Eŭropo, kaj la ĉefurbo estas Helsinko. Kvarono de la teritorio situas en la nordo de la nordpolusa cirklo, Laponio.

LAPONIO aŭ SAMEA REGIONO atingas kvar teritoriojn: Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Rusio, kie vivas ĉirkaŭ 100.000 SAMEOJ, en areo de 390.000 m². Ili parolas la SAMEAn LINGVON. La vorto LAPONO rilatas al laboro kiel ĉasisto, fiŝkaptisto kaj boacobredisto.

La vorto SAMEO rilatas al la etno. LAHTIO, la kongresa urbo, kun preskaŭ 120.000 loĝantoj, estas la oka plej granda urbo en Finnlando. Ĝi estas konata pro vintraj sportaj eventoj. Unu el la plej rimarkeblaj vidindaĵoj de Lahtio estas la SKISALTEJOJ, kaj la bela, luksa kaj renoma koncertejo SIBELIUS-DOMO, konstruita en la jaro 2000, kiu ricevis sian nomon de la fama finna komponisto Jean Sibelius.

La kongresejo estis la ISKU AREENA, sidejo de la glacihokea teamo PELIKANOJ, tre taŭga strukturo por sportaj eventoj.

MARK Fettes, Prezidanto de UEA, prezidis la solenan inaŭguron kaj faris paroladon. Margareta Zaleski



Zamenhof, pranepino, nome L.L.Zamenhof, salutis esperante la ĉeestantojn.

La ĉeftemo VIVANTA NATURO, FLORANTA KULTURO, estis prezentata per tri podiaj diskutoj kaj pluraj aliaj kunvenoj, kunligante la temon al kultura diverseco, ekonomia tutmondiĝo, egaleca pritrakto de la homoj, daŭripova evoluigo en diversaj sencoj, kaj precipe indiĝenaj lingvoj. Per feliĉa koincido, 2019 estas proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco, kiel la JARO DE INDIĜENAJ LINGVOJ.

NOVA ESTRARO: Duncan CHARTERS, brito, estis elektita nova Prezidanto de UEA, kaj Fernando Maia, brazilano, Vicprezidanto.

Dum unu semajno okazis prelegoj, nacia kaj internacia artaj vesperoj, (kantoj, dancoj, deklamado,

koruso), koncertoj, (Manuel, Jomo, Saŝa, Jele, Asorti, Kajto), teatraĵo, filmoj, ktp.

FUTBALMATĈO – La teamo formiĝis surloke dum la unuaj tagoj de la UK, do ili ne havis multe da tempo por trejnado, tamen ili venkis, 5 x 2, ludante kun la loka teamo TIINAN TIKERIT. La unuan fojon en la historio de nia teamo ludis ankaŭ virinoj, ili estis kvar.

SOLENA FERMO: La nova Prezidanto Duncan CHARTERS, prezidis la solenan fermon, kaj vokis la reprezentantojn de la urbo Montrealo/Kanado, por la transdono de la Esperanta Flago, por la organizado de la venonta 105-a UK, en aŭgusto 2020.

La 106^a UK/2021 okazos en Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando, en Julio/2021. ■



La Tulipoj

CRISTINA GRAAF

Nederlando. Lando konata pro siaj muelejoj, tulipoj, ligno-ŝuoj, fromaĝoj, bicikloj, digoj. Lando de artistoj kiel Rembrand kaj Vincent Van Gogh. Kaj ankaŭ pro tradiciaj valoroj kaj civilaj virtoj, kiel socia toleremo, liberema politiko pri samseksemeco, drogoj, prostitueco, eŭtanazio kaj aborto.

Malgraŭ la malgranda teritorio, en ĝiaj fekundaj ebenaĵoj ĝi fariĝis la dua plej grava eksporta lando pri agrokulturaj produktaĵoj en la mondo. Ĝi estas superata de Usono, kaj Brazilo estas la tria. Per alta teknologio kaj utiligado de ĉiuj spacoj, ĝi produktas betojn, terpomojn, tomatojn, legomojn, fruktojn kaj ...florojn!

La pasio de nederlandanoj pri floroj estas malnova. La floro kiu simbolas la landon estas tulipo. Kvankam ĝi ne originis tie, ĝi estas intime ligita al la historio kaj kulturo de tiu popolo.

Tulipo estas bela floro de la familio de lilioj. Kun ĉirkaŭ cent variaĵoj, tulipoj havas foliojn kiuj povas esti oblongaj, ovalaj aŭ lancformaj. El bulbo eliras la folioj kaj el la centro de la foliaro leviĝas vertikala tigo, kun ununura floro formita per ses petaloj, en formo de renversita turbano. De tie ĝia nomo originas.

Tiu planto estas origina de montoj en Persio, nuntempe Irano kaj Turkio. Ĝi estis konsiderata juvelo, kaj ĝia kultivo estis permesata nur en reĝaj kasteloj. Ĝi estis nomata "Tulband", (turbano), poste ŝanĝita en Francio al "Tulipe".

Tra la Silka Vojo, dum la dek-sesa jarcento, ĝi disvastiĝis tra la mondo.

Ĝi alvenis al Nederlando en la jaro 1592, kiam Ogier de Busbacq sendis iom da bulboj al Charles de L'Écluse (ankaŭ konata kiel Carolus Clusius), kiu plantadis ĝin en sia ĝardeno por medicina kaj dekoracia celoj. Sed ĉar ĝi estis nekutima planto, la bulboj estis konstante ŝtelitaj.

Tie komenciĝis florkomercio. Ĝi fariĝis simbolo de povo kaj socia statuso, ĝi estis malofta kaj multekosta, ĉar la produktado estis malrapida kaj malfacila. La bulboj bezonas sep ĝis dek jaroj por flori, dum la monatoj aprilo kaj majo, kaj produktas nur unu floran.

De tiam la nederlandanoj obsediĝis pri la floro. Ĝi fariĝis luksa objekto inter riĉuloj kaj posedo de unu aŭ kelkaj vergoj estis simbolo de riĉeco kaj potenco. Ju pli malofta, des pli multekosta. La apero de striita vario de purpura pigmento de supermezura beleco kaŭzis furoron. Ĝi estis nomata *Semper Augustus*. Nekonata tamen estis, ke ĉi tiun variaĵon kaŭzis viruso, kiu malfortigis la planton, kvankam ĝi estis pli bela. Krome, indas memori, ke en tiuj tagoj, mikrobiologia vivo ankoraŭ estis nekonata. Kaj tio, kio estas malofta kaj ekskluziva, fariĝas pli multekosta. Ĉi tiu tendenco estis tiel forta, ke prezoj altiĝis 20 fojojn



en unu sola monato. Homoj de ĉiuj klasoj vendis siajn havaĵojn kaj interŝanĝis siajn varojn kontraŭ simpla bulbo, por revendi kaj profiti post kelkaj tagoj.

Por eviti la problemon de sezoneco, kaj por subteni komercon, oni ekis vendi tulipajn kontraktojn, same kiel ĉe modernaj borsoj. Subskribante kontraktan tulipon, la aĉetanto promesis aĉeti tulipon ĉe la fino de la sezono kontraŭ certa prezo. Tiel aperis tiutempe la unua merkato de derivaĵoj en la mondo.

Tulipoj povus esti interŝanĝitaj kontraŭ tero, bestoj aŭ eĉ domo en Amsterdamo. Unu bulbo povus esti valora je 24 tunoj da tritiko, 1 tuno da butero (100 guldenoj) aŭ 8 grandaj porkoj (240 guldenoj). Ĉirkaŭ la jaro 1635 la vendo de 40 bulboj kontraŭ cent mil guldenoj estis rekordo. Alia rekordo estis la vendo de ununura Semper Augustus-bulbo por ses mil guldenoj en Haanlem.

Tulipomanio, kiel ĝi fariĝis konata, daŭris kelkajn jarojn. En la vintro de 1637, aĉetanto en la sama vilaĝo Haanlen ne honoris sian kontrakton kaj tio kaŭzis panikon en la merkato. Post apenaŭ kelkaj tagoj, prezoj falis al centono de sia merkata valoro. Eĉ pli malbone, rezultis, ke multaj vendistoj aranĝis kontraktojn, vendante pli da ampoloj ol ili fakte havis. La bobelo eksplodis! Vidante la devalorigon de la plantoj, aliaj aĉetantoj decidis ne honoru siajn kontraktojn, kondukante multajn vendistojn al bankroto. Homoj, kiuj investis ĉion, kion ili havis, troviĝis de nokto al tago posedanta nur senvaloran ĝardenplantan bulbon.

Laŭ la tempopasado, venis la kolektoj de la obligacioj. Bankoj, vendistoj, floristoj, investantoj, ĉiuj

volis ricevi la valorojn de siaj titoloj. Sed kies fakturo? Estis du jaroj da streĉiĝo en la merkato ĝis la registaro intervenis kaj deklaris, ke la kontraktoj estos nuligitaj, kondiĉe ke almenaŭ 3,5% de ilia alĝustigita valoro estu pagita. La unua financa merkata veziketo de la mondo rezultigis severan ekonomian depresion, kiu postulis jarojn por esti superata kaj timigis nederlandajn investantojn, kiuj multe pli suspektis pri iu ajn spekula investo. Sed ili ankoraŭ ŝatadas tulipojn!

Jarcentojn poste, pro la malfacilaĵoj de la dua mondmilito, la nederlandanoj utiligis tulipojn por ĉio: ili kuiris sian bulbon por manĝi, faris tortojn, rostis ilin por fari trinkaĵon kiel kafon. Ĉi tiu speco de manĝado helpis multajn homojn postvivi. Pro tio, la tulipo fariĝis konata kiel simbolo de postvivado.

Nuntempe, Nederlando ankoraŭ estas konata pro siaj tulipaj kampoj, krom aliaj floroj, kaj estas karese nomata "monda florvendejo". Kaj troviĝas en la floro pli ol simbolo de la lando: krom ĉarmigi homoj per la koloroj, la tulipoj movas la komercon kaj la turismon. Nederlando havas ĉiujarajn enspezojn de ĉirkaŭ 600 milionoj da eŭroj de la florkomerco. Eĉ la eŭropa krizo ne forpelis klientojn. Nederlando respondecas pri 90% de monda tulipoproduktado kaj eksportas 2 miliardojn da bulboj al pli ol 80 landoj tutmonde, inkluzive al Brazilo, tra la nederlanda kolonio Holambra, kiu importas la bulbojn, kultivas kaj vendas ĝin tra la tuta nacia teritorio. ■

Leonardo da Vinĉi – 500 Jaroj de la Arketipo de la Renesanco

JOSÉ MAURO PROGIANTE

Ĉi-jare en la tuta mondo okazis kaj ankoraŭ okazas eventoj por memori la vivon kaj verkon de la italo Leonardo da Vinĉi, de ĉiuj admirata pro sia genieco kaj multifacetaj talentoj. Post 67-jara eksterordinara vivo, plena da ravaj realigaĵoj kaj imagaĵoj en kampoj tiel diversaj kiel pentroarto kaj biologio, li forpasis en la 2-a de majo 1519, do antaŭ 500 jaroj.

Naskiĝinte kiel ekstergeedzeca filo de la notario Piero da Vinĉi, Leonardo edukiĝis en la ateliero de la fama florenca pentristo Verrochio, kiu agnoskis sin superita de la disĉiplo, laŭ la historiisto Giorgio Vasari.

Estas malfacile difini kio estis Leonardo, rekonata kiel pentristo, skulptisto, inventisto, arkitekto, inĝeniero, botanikisto, matematikisto, muzikisto, anatomiisto, ktp. Fakte li ĉiam elmontris senliman scivolemon kaj kapablon esplori simultane plurajn branĉojn de la scienco kaj belarto. Leonardo translokiĝis diversfoje. Krom Florenco, en Italio, li vivis ankaŭ en Milano, Romo, Bolonjo kaj

Venecio, ĉiam laborante por potenculoj, kiel Lorenzo de Mediĉo, Ludoviko Sforza, Cezaro Borgia kaj la papo Leono la 10-a. Kaj siajn lastajn jarojn li pasigis en Francio, en bieno donacita de la reĝo Francisko la 1-a.

Por multaj homoj, la ĉefa aktiveco de Leonardo estis la pentroarto. Fakte li estis elstara pentristo, tiel ke unu el liaj kreaĵoj – *Mona Lisa (La Gioconda)* – estas la plej fama en la mondo. Aliaj gravaj verkoj liaj estas *La Sankta Manĝo, Anunĉiaco, La Adorado de la Tri Reĝoj, La Virgulino de la Rokaro, La Damo kun Ermeno kaj Sankta Johano la Baptisto.*

Tamen, pro diversaj motivoj – prokrastemo, refaroj pro eksperimentado de novaj teknikoj, manko de subskribo, eĉ kvereloj –, multaj el liaj pentraĵoj ne finiĝis aŭ perdiĝis. Ekzemple, li ne finis la menditan pentraĵon *La Adorado de la Tri Reĝoj*, ĉar li sentis sin ofendita de la papo Siksto la 4-a, kiu elektis Mikelanĝelon, kaj ne lin, por ornamo la Sikstan Kapelon, en Vatikano.

“KIU PENSAS
MALMULTE, TIU
ERARAS MULTE”

Unu el la bonaj rezultoj de la nunaj jubileaj omaĝoj al Leonardo estas la reliefigo de la diverseco de liaj interesoj kaj sekve la atentigon al la projektoj kaj ideoj entenataj en liaj miloj da notoj. Nur tiel eblas kompreni lian geniecon kaj kreivemon.

Kvankam multaj el la elpensajtoj de Leonardo restis surpapere, ĉefe pro tio, ke ilia konstruado bezonus teknologiaĵojn ne ekzistantajn tiam, oni rekonas, ke li malkovris la principojn de funkciado de la imagitaj maŝinoj kaj antaŭvidis ilian realigadon. Li elpensis, interalie, helikopteron, tankon, paraŝuton, kalkulilon, helicon kaj roboton.

Eble la plej grava kontribuo de Leonardo al la homaro estis lia sinteno antaŭ la naturo, kiun li konstante studis. Tiel aginte, li iel inaŭguris la modernan sciencan bazitan sur observado kaj eksperimentado. Siajn esplorojn li priskribis per pli ol 50 mil manuskriptoj kaj desegnaĵoj, el kiuj restis ĉirkaŭ 13 mil, plej multaj arkivitaj en Vatikano. Unu el liaj plej famaj manuskriptoj – *Codex Leicester* – apartenas al Bill Gates, kiu ĝin akiris por 30,8 milionoj da dolaroj.

Nuntempe, kiam bedaŭrinde disvastiĝas kaj gajnas adeptojn falsaj konceptoj, sen sciencaj fundamentoj, pli miriga montriĝas la biografio de

Leonardo da Vinĉi, lia mensklareco kaj intelekta humileco. Li nomis sin homo senklara, ĉar li ne frekventis universitaton, tamen lia verkaro pravas, ke tute ne malhelpis lin la manko de formala instruiteco.

Indas atenti pri la du sekvaj pensoj de Leonardo, kiuj spegulas lian personecon:

“Kiu pensas malmulte, tiu eraras multe.”

“Malmulto da scioj estigas orgojlulojn. Multo da scio estigas humilulojn. La sengrajna spiko turnas sin fiere al la ĉielo, dum la plengrajna spiko turnas sin al la tero, ĝia patrino.” ■

Dum la 86-a Itala Kongreso de Esperanto, en la urbo Triesto (24-31-a de aŭgusto 2019), okazis seminario pri “La heredaĵo de Leonardo da Vinĉi post 500 jaroj de lia morto”.

En San-Paŭlo okazas la ekspozicio “Leonardo da Vinĉi – 500 jaroj de geniulo” (2-a de novembro 2019 – 1-a de marto 2020 – MIS-Muzeo de Bildo kaj Sono – Str. Vladimir Herzog, 75 – San-Paŭlo)

Unuiĝintaj Nacioj kaj Ni, Esperantistoj

PAULO SÉRGIO VIANA

En la adreso <https://rev.uesperanto.org/oon> troviĝas freŝa grava artikolo de la mondkonata, respektigata Esperantisto Renato Corsetti.

Ŝajnas al mi, ke ĝi meritas apartan atenton kaj diskonigon.

Resume, jen ĝia enhavo:

Nia nuntempa mondo ankoraŭ estas plena de maltoleremo, maljusto kaj malamo. Ni Esperantistoj, omaĝe al Zamenhof kaj respektu al nia plej interna kulturo, havas moralan devon kontribui por plibonigi la mondon, laŭ nia povo. Ekzistas aliaj institucioj, kiuj pensas kaj agas tiudirekte - ekzemple Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj. Estas do nature, ke ni proponu apogon kaj laŭeble kunlaboradon kun tiaj institucioj.

UN fariĝas 75-jara, kaj malgraŭ ĉiaj kritikoj ĝi konstruis al si figuron de respekto. Ĝi nepre meritas atingi sian 100-jaran jubileon ankoraŭ pli forta. UN batalas por homaj rajtoj - ankaŭ ni (precipe en la kampo de komunikado); UN batalas por socia



UNESCO

evoluo - ankaŭ ni (precipe en la kampo de komunikado); UN batalas por paco - ankaŭ ni (precipe por starigo de demokratia komunikado).

Kiel do ne starigi pli intiman kunlaboradon inter Esperantistoj kaj UN/Unesko?

La ĉeftemo de la Universala Kongreso en Montrealo, en la jaro 2020 estas: “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo”. Akademiano Corsetti alvokas do ĉiujn Esperantistojn al pripensado, diskutado kaj eventuale agado, rilate tiun temon. Ĝi ne estu nur formala “kongresa ĉeftemo”, sed fakte objekto de studo kaj aktivaj esprimoj en nia Esperanta mondo. Ni konsideru ĝin en niaj rondoj, kluboj, asocioj, interretaj kontaktoj.

Se vi konsentas, diskonigu ĉi tiun iniciaton, mem skribu al Corsetti kaj lasu ĉe li viajn ideojn ĉi-koncerne.

Jen lia adreso:

renato@esperanto.org

Esperanto kaj Teozofio

HERBERT A. WELKER

Mi lernis Esperanton memstare antaŭ pli ol dudek jaroj kaj mi apogis ĝin, sed – i.a. pro manko de tempo – mi faris preskaŭ nenion per la internacia lingvo, t.e. mi ne parolis nek skribis en Esperanto kaj legis malmultege. Nur kiam je la fino de 2013 (tiam mi jam estis pensiulo) mia edzino petis al mi partopreni kun ŝi en la Universala Kongreso en Bonaero kaj mi konsentis, mi komencis dediĉi min al ĝi. Post la kongreso mi komencis kunlabori en la Esperanta Retradio, por kiu mi ekde tiam ellaboras tekston ĉiusemajne (kun interrompo de kelkaj monatoj).

Pro tio ke mi estas membro de la Teozofia Societo ekde 2005 mi ekhavis la ideon establi rilaton inter Teozofio kaj Esperanto. Evidente mi serĉis en la interreto tian rilaton, t.e. tekstojn en Esperanto pri Teozofio, sed mi trovis tre malmultajn.

Antaŭ ol daŭrigi ĉi tiun rakonton mi klarigu mallonge kio estas Teozofio.

La vorto “Teozofio” (kiu devenas el la greka kaj signifas „Dia Saĝo” aŭ “Dia Saĝeco”) jam aperas en la Biblio, sed ĝi iĝis konata nur post la fondiĝo de la Teozofia Societo (T.S.) en 1875 en Novjorko. Tiu societo, kiu ekzistas nuntempe en ĉirkaŭ sesdek landoj kaj kies devizo estas “Ne ekzistas Religio supera al la Vero”, havas tri celojn:

Formi kernon de universala frateco de la homaro sen distingo de raso, kredo, sekso, kasto aŭ koloro;

- Instigi al studado de kompara religio, de filozofio kaj scienco;
- Esplori la neklarigitajn leĝojn de la naturo kaj latentajn homkapablojn.

La brazila branĉo estis fondita en 1919 kaj do festis sian 100-jaran jubileon antaŭ kelkaj monatoj. Ĝia sidejo estas en Braziljo, kie ĉiusemajne okazas studoj kaj prelegoj (kiel ankaŭ en aliaj urboj).

Bone, kion mi faris por establi la menciitan rilaton?

Unue mi faris en la sidejo de la T.S. portugallingvan prelegon pri “Esperanto, Homaranismo kaj Teozofio” por diskonigi Esperanton inter la teozofiistoj.

Poste mi kreis je la fino de 2014 la (Esperantan) retejon “Teozofio Esperante”, en kiu mi diskonigis kelkajn tekstojn pri Teozofio kiujn mi estis tradukinta dum la antaŭaj monatoj, kaj ekde tiam mi aldonis pliajn tekstojn.

En 2015 mi produktis libreton (sen eldonejo) titolitan *Eltiraĵoj el la Leteroj de la Majstroj de Saĝo kaj kelkaj malgrandaj tekstoj pri Teozofio*. En la 100-a UK (en Lillo, Francio) mi kaj mia edzino partoprenis en la “Movada Foiro”, kie ni reprezentis neoficiale la T.S.-n kaj kie ni eksponis tiun libreton kune kun

panelo diskoniganta informojn pri la T.S. Ni ankaŭ disdonis faldfoliojn pri la T.S..

La samon ni faris dum la “Movada Foiro” de la UK de Nitro en 2016, sed en ĝi ni eksponis tri aliajn libretojn kiujn mi estis produktinta antaŭe (anstaŭigante la menciitan libreton kaj aldonante novajn tekstojn): *Teozofio kaj la Teozofia Societo*, *Eltiraĵoj el la Leteroj de la Majstroj de Saĝo* kaj *Enkonduko al la Teozofio*.

En Brazilo mi jam estis farinta prelegon pri Teozofio en februaro en la Taguatinga Esperanto-Klubo.

En marto de 2017 mi faris en la sidejo de la T.S. portugallingvan prelegon pri “La Rilatoj inter Teozofio kaj Esperanto”. Tiun prelegon – iomete modifitan kaj nun kun la titolo “La rilatoj inter Esperanto kaj Teozofio” – mi prezentis en la Brazila Kongreso de Esperanto de la sama jaro en la urbo Sorriso. En la prelego mi montris tion, kio jam estis publikigita Esperante en la mondo pri Teozofio. Krome mi disdonis – kiel en ĉiuj brazilaj Esperanto-renkontiĝoj en kiuj mi partoprenis – Esperantajn faldfoliojn pri la T.S.

Fine mi organizis la libron *Teozofio – Kolekto de Novaj kaj Malnovaj Tradukaĵoj*, kiun mi publikigis per eldonejo en 2018. En ĝi mi kunigis miajn antaŭajn tradukaĵojn (kiuj estas la “novaj” de la titolo) kaj malnovajn,

t.e. teozofiajn tekstojn tradukitajn de aliaj esperantistoj kaj publikigitajn inter 1902 kaj 1973.

Ekde 2018 tiu libro estas en la katalogo (do aĉetebla) de la Brazila Esperanto-Ligo (BEL) kaj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Recenzo de la brazila esperantisto Fernando Pita (kiu estis reviziinta la libron) aperis en la marta numero de 2019 de la revuo *Esperanto*, kaj pri la verko mi faris prelegon en Taguatinga Esperanto-Klubo. Samjare mi donacis ekzempleron al la biblioteko kaj de la Kulturdomo de Esperanto en kastelo Greziljono (Francio) kaj de la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kaj ekde kelkaj monatoj mi disdonas ekzemplerojn en la sidejo de la T.S. por ke pliaj teozofiistoj ekkonu Esperanton.

Mi invitas ankaŭ vin iomete ekkoni Teozofion, legante tekstojn en mia retejo „Teozofio Esperante“ aŭ en la menciita libro. Kaj en Jutubo vi povas spekti mian portugallingvan prelegon faritan en la T.S. – do por teozofiistoj – pri la rilatoj inter Teozofio kaj Esperanto (<https://www.youtube.com/watch?v=Yrj2T0vzLno&t=1984s>). ■

Principo de Necerteco

PAULO P. NASCENTES

Ĉu kuŝas la tradukarto sur la Principo de necerteco? Estus duboj pri tio. Eble tial, iom post kiam mi eklernis Esperanton, cele ĝin ellerni, mi komencis verki esperante kaj portugalingi la verkaĵojn aŭ, male, esperantigi la portugalingajn. Tiel naskiĝis la pripoezia blogo nome www.papospnascntes.com. Ĝuo venis tiam, kiam ĝi fariĝis internacia pripoezia babilejo danke al la Lingvo Internacia.

Principo de incertidumbre povus veni lumen esperante, ĉar la Aŭtoro, Alejandro Cossavella, konata de multaj legantoj, estas esperantisto, muzikisto, komponisto. Li tamen preferas verki hispane por sia blogo. Cele montri al vi la simplan, neluksan, sed poezian tekston de Alejandro, mi decidis el la originala ĝin esperantigi. Certe aliaj el vi malsame ĝin tradukus. Certe. La originalan formaton mi konservis. Jen ĝi:

PRINCIPO DE NECERTECO, de Alejandro Cossavella

Komence estis la necerteco.

Poste, ankaŭ.

*Ĝi se tio, kion vi serĉas estu ĉi tie, estus malprobable ke ĝin vi trovu.
Se vi povus ĝin trovi ĉi tie, jam ĝin estus trovinta ie ajn, en alia ĉi tie.*

*Vi povus objeti, ke ĉi tie nepre estus la unua, kaj certe povus esti ĉi tie.
Kaj mi povus diri nek jes nek ne, nek blanka nek nigra, ĉar tio estus vero kaj malvero — kaj ĉiuj intermezaj gradoj, kiuj verŝajne ĉiuj apartigas — samtempe.
Kiam io estas tiel, mi aŭdacas diri nenion.*

*Mi min limigas silenti aŭ gustumi glaciaĵon.
Nun la afero densiĝis.*

Nun oni devas foriri.

*Jam ne sufiĉas diri, ke eblas: oni nepre devas tion montri per konkretaj faroj.
Do, por hodiaŭ, mi ne povos doni al vi multe plu.
Mi estas ankerita, hipnotigita.*

Nenio doloras, nenio min entuziasmigas.

*En griza tago, kiam la elektrokardiogramo bruas piiiuiiiiiiiiiiiiiiiii, sed daŭre mi spiras.
Ni vidu, ĉu morgaŭ mi revivos.*

*Sed se ne, kiel diris José Velez, kio gravas? kio gravas? kio gravas?
Estas tiom da vivo kaj tiom da morto ĉirkaŭ ni, ke unu pli, unu malpli ne elprenos
gracon el la tuto.*

Se mi rajtas rekomendi la legadon de la blogo “Atracción vital: el amor en la era digital”, vigle mi tion faras. Se la selektita teksto ne vin allogas, certe alia tion faros. Cetere rekomendinda estas la ideo esperantigi kelkajn! Ĉu vi pretas? ■

Disciplino estas Libereco

ISIS C. OKABE PITON

Antaŭ kelkaj tagoj mi vizitis miajn gepatrojn kaj ni parolis pri niaj vivoj de infaneco ĝis hodiaŭ. Nuntempe mi estas kvardektri-jara, miaj gepatroj preskaŭ sepdek-jaraĝaj. Por ni ĉiuj estis la samaj sentoj: ni vivis, ĝuis, eraris, pentis, sukcesis, batalis, suferis, feliĉiĝis, fieriĝis, malĝojiĝis, malfieriĝis, ploris, vibris kaj kvankam ni estas malsamaj homoj, travivintaj nian junaĝon en malsamaj epokoj, urboj, socia sistemo, homoj kaj kondiĉoj, ni ĉiuj

travivas samajn sentojn por nia evoluado. Ĉiuj bedaŭras pri kelkaj siaj eraroj, sed estis tiaj vojoj kun trafaj kaj eraroj, kiuj igis nin tiaj, kiaj ni estas hodiaŭ. Konklude, ni vidas ke ne estas vivo sen eraroj, neniu naskiĝas scianta ĉion kaj trafanta nur la elektojn, kiujn la vivo donas al ni. Do ni tostu ankaŭ al niaj eraroj, kiuj lernigis nin.

La psikanalizisto Freud studis pri mensa meĥanismo, kiun li nomis “Plezura principo kaj reala principo”.



Maratona Internacional de São Paulo

La plezura principo deziras nur tion, kion ni ŝatas, kio estas amuza kaj plezuriga, kiel manĝi tre bongustajn dolĉaĵojn, amuziĝi, ripozi, vojaĝi, nur venki ktp... La principo de realeco diras: se vi multe manĝas vi estos malsana, se vi nur ripozas vi ne atingos viajn celojn, ke oni perdas nun ion amuzan por en la estonteco atingi ion pli valoran, kiel ekzemple profesion kreskadon, bonan salajron, ktp. La saĝeco loĝas en la ekvilibro inter ĉi tiuj mensaj fortoj de nia animo.

Lerni atendi, frustriĝi, akcepti, batali, rezigni, persisti, tion oni eklernas en nia infanaĝo kaj daŭras lernante tra la tuta vivo.

En nia nuntempa socio, la gepatroj tro multe laboras kaj ne havas tempon por siaj idoj. Multaj por kompensi siajn mankojn, evitas rifuzi ion ajn al ili. Foje oni ne komprenas, ke infanoj bezonas la gepatran kunvivadon. Oni bezonas malpli da aĵoj kaj pli da kompanio. Pli da instruoj pri amo, honesteco, lojaleco, etiko, dankemo, kiel konduki en familio, en la socio, en la lernejo. Hejme oni povas ekkompreni pri malgrandaj perdoj, tio estas, lasi la plezuron kontraŭ io, kion estas ĝuste

fari. Tio lernigas nin kiel travivi la kompleksan realaĵon de la plenkreskula vivo, ĉar sana plenkreskulo estas persono kapabla flankenlasi plezuron kiam necese kaj elteni la ordinarajn frustriĝojn de la ĉiutaga vivo por atingi siajn pli grandajn celojn.

Niaj kapabloj estas konstruataj per malgrandaj perdoj, elektoj, eraroj, ne nur pere de la atingitaj sukcesoj. Multaj ne komprenas, ke la vojoj, kiujn mirindaj homoj faris por atingi sian sukceson, postulis paciencon, humilecon, ke oni lernu per la eraroj, ekstaru, pardonu, memfidu, kuraĝu, laboru, penu por atingi la rezulton.

Kiam oni travivas malbonajn rezultojn oni ne devas resti en doloro de malvenko, oni devas klopodi kompreni tion, kio okazis por tia rezulto, lerni, ŝanĝi la manieron fari kaj agi. Oni devas ekstarti kaj ne iĝi amara homo, ĉar niaj ĉefaj celoj ĉiam samas, nome esti feliĉaj, ami, esti amataj. Por sukcesi oni bezonas esti etika, digna en la sintenoj kaj la amo por ke nia travivado ne perdu la sencan. ■

El la vivo de Fajrobrigadisto

EN LA UNUA TAGO

ALENCAR LIMA ESMERALDO

En la jaro 1990, mi komencis mian karieron kiel fajrobrigadisto. En tiu tempo, por tia laboro estis necese lerni la funkciadon de sav-veturilo, de veturilo kontraŭ bruloj kaj de alia aŭtomobilo uzata por sukuroj.

Dum unu monato mi lernis pri la materialo disponebla en la kamiono por savoj, bruloj, ktp.

Kiam mi finis la lernadon, mia ĉefo submetis min al ekzameno por kontroli, ĉu mi kapablas venturigi la aŭtojn rapide. “Rapidi” signifas parton de teamo, kiu laboras en fajroventurilo.

Mi aprobiĝis ekzamine kaj mia ĉefo, subleŭtenento Cofani, ordonis, ke mi laboru kun li. Kia emocio en ĉi tiu momento: mi eklaboris en la brul-venturilo!

En mia unua tago kiel laboristo en la brul-venturilo, okazis nur bruloj en herbaĉaj kampoj, en rubaĵoj kaj simile. Tiel pasis trankvile la unua tago.

Mi iris al mia hejmo por ripozi, kaj post 48 horoj mi revenis por labori. La periodo de laboro estas 24-hora, kontraŭ 48 horoj da ripozo.

Post 2 tagoj mi do revenis al la kazerno por labori, ni eklaboris je la oka horo. En la korto troviĝis veturiloj kontraŭ bruloj kaj veturiloj por sukuroj. Oni sendis brigadistojn por kontroli la perfektan staton de la tuto.

Kutime ni kontrolis la veturilojn. Se la materialo estas tute en ordo, ni devis funkciigi kaj veturi per la koncerna veturilo por konfirmi ĝian bonan staton. Poste, ni revenis al la kazerno kaj faris “simuladon” pri

akcidento, kiun la estro donis al ni. Ekzemple: homo premita inter feraĵoj post akcidento, viktimo en altaj lokoj, brulo en domo, k.s.. Li elektis unu en ĉi tiuj okazaĵoj kaj ordonis, ke ni agu konforme.

Antaŭ la manĝo, kriado eksonis: “Atentu trupo kontraŭ bruloj!” , troviĝas fajro en hejmo, adreso X numero Y.

Miaj kruroj ekstremis de emocio, ĉar tiu estos mia unua sukur-okazaĵo. En tiu tempo ni “kuris malantaŭ la kamiono” - oni diris, ke ni veturas pendantaj.

Kia emocio! La vento blovis, la kamiono sirenadis... Hura!...

Ni alvenis al la koncerna loko, kaj la estro de la teamo ordonis, ke ni preparu ilon kontraŭ militanta fajro. En ĉiuj linioj de akvotuboj laboras du fajrobrigadistoj aŭ fajrobrigadistinoj, kaj ĉe unu el la ataklinioj troviĝis mi kaj mia amiko Valdeci. La domo estis brulanta, ni disĵetis akvon per akvotubo, mi memoras, ke troviĝis multe da papero en tiu loko, nome materialo por recikligo. Kiam ni sukcesis estingi la fajron ekster la domo, tiam ni trarompis la pordon por eniri kaj estingi la internan fajron. Ni eniris kaj estingis la fajron. En certa momento mi rigardis sofon duonbrulantan kaj mi vidis pupon. Mi diris al mia amiko: “Vidu pupon!” Sed kiam mi pli bone atentis, mi rimarkis, ke tio ne estas pupo, sed bebo, kiun patrino lasis dormanta sur la sofo, en la vizitĉambro.

Por nia malfeliĉo, la bebo estis mortinta! Ĝi mortis kun suĉilo en la

buŝo.

Kiam mi vidis tiun scenon, mi eksentis ion strangan. Mia koro kunpremiĝis, mi sentis min vundita per tio, kio okazis al la bebo. Mi ne emis konjekti, kial tiu patrino lasis sian bebbon tie: simple okazis la terura morto de bebo. Ni foriris. Ni restis ekster la domo. La teamo alvenis kaj vidis la okazintaĵon. Ili esprimis similan senton kiel la mia.

Poste ni vokis la policon por fari registron kaj ni faris nian raporton. En ĉi tiu tago ni revenis en la kazernon malĝojaj, ni ne sukcesis manĝi, dum la tuta cetera parto de la tago mi ne sentis min bone. Finiĝis mia laboro, mi iris al mia hejmo pensante pri tiu la okazaĵo. Longan tempon mi pensis kaj mi pensas ĝis hodiaŭ. Tiu okazaĵo ne lasis mian menson, laŭ la tempopasado. ■

VERSOS DE NATAL

Poezio

Espelho, amigo verdadeiro,
Tu refletas as minhas rugas,
Os meus cabelos brancos,
Os meus olhos míopes e cansados.
Espelho, amigo verdadeiro,
Mestre do realismo exato e minucioso,
Obrigado, obrigado!

Mas se fosses mágico,
Penetrarias até ao fundo deste homem triste,
Descobririas o menino que sustenta esse homem,
O menino que não quer morrer,
Que não morrerá senão comigo.
O menino que todos os anos na véspera de Natal
Pensa ainda em pôr os seus chinelinhos atrás da porta.

KRISTNASKAJ VERSOJ

Spegulo, vera amiko,
Vi reflektas miajn haŭtajn sulkojn,
Miajn blankajn harojn,
Miajn miopajn, lacajn okulojn.
Spegulo, vera amiko,
Majstro de preciza, detala realismo,
Dankon, dankon!

Sed se vi estus magia,
Vi penetrus ĝisfunde en ĉi tiun tristan homon,
Vi malkovrus la knabon, kiu subtenas tiun homon,
La knabon, kiu ne emas morti,
Kiu nur mortos kun mi.
La knabon, kiu ĉiujare, en la antaŭtago de Kristnasko,
Ankoraŭ pensas meti siajn pantofletojn malantaŭ la pordon.

PAULO SÉRGIO VIANA

PRI LITERATURO

BLUA SONGÔ EN ANTVERPENO

Aŭtoro: José Mauro Progiante
Eldonejo Esprima, Brazilo, 2019,
60 paĝoj.

Porinfana literaturo ne estas facila literaturo. Ĝi prezentas kelkajn problemojn, kiuj postulas de aŭtoroj sentemon kaj ĝustan komprenon pri la funkciado de infana menso. Ne temas nur pri verkado per simpla, banala, senornama lingvo; ne temas pri verkado de nur naivaj rakontoj. Verki por infanoj male postulas plurajn zorgojn: oni devas decidi pri tio, al kiomaĝaj infanoj destiniĝas la verko; oni devas uzi senkomplikan stilon, tamen viglan kaj amuzan; oni devas elekti temojn (aŭ situaciojn), kiuj allogas infanojn; oni devas trovi taŭgan longecon de la rakonto, por ke ĝi ne estu laciga, sed ankaŭ ne tro densa kaj seka; fine, oni devas bone illustri la libron per taŭgaj, ne nur belaj, sed helpaj bildoj, kiuj faciligas la komprenon de la rakonto mem.

“Blua Songô en Antverpeno” estas bona ekzemplo pri trafa infanlibro

en Esperanto. Progiante ne estas novulo en tiu ĝenro. En 2018, li estis premiita en la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, pro sia antaŭa bela verko “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”.

Ĉi tiu nova volumo rakontas pri grupeto da infanoj, kiuj implikiĝas en agadon de banditoj, kiuj volas rabi la diamanton “Blua Songô”. La historio fluas en sufiĉe aventureca tono, kun multaj neatenditaj okazaĵoj. Multaj nomoj kaj detaloj postulas atentan legadon, se oni volas bone sekvi la intrigon. La tuto miksas ekvilibrajn dozojn da fantazio kaj realismo, tiel ke ĝi fariĝas vere atentokapta kaj incita. La plurnacieco de la infanoj kaj de aliaj roluloj subtile sugestas la ideon pri internacia kunlaborado kaj egaleco inter ĉiuj homoj en la mondo. Samtempe ĝi sugestas ankaŭ, ke



amikeco kaj idealismo devas ne spiti la ekziston de krimuloj kaj fiuloj en la mondo - kiujn oni devas kontraŭbatali per ruzeco kaj inteligento.

La tuta verko fluas en vigla, natura lingvo, sen komplikaj frazaranĝoj aŭ vortkunmetoj. Ĝi estas facila, sed ne banala. Kvankam oni ne indikis la aĝon, al kiu ĝi destiniĝas, supozeble oni povus kalkuli, ke la ideala publiko devas esti inter 9- kaj 13-jaraj infanoj.

Mi trovis tre malmultajn, negravajn tajperarojn, sed unu el ili meritus

korekton, en estontaj eldonoj: la uzon de “post” anstataŭ “poste” (paĝoj 9 kaj 41).

La papero estas bona, la preso eminenta, la kovrilo malmola kaj firma, la ilustraĵoj tute trafaj kaj belaj.

Jen bela libro por Kristnaska donaco! Gratulon al la aŭtoro kaj al la Eldonejo! ■

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WESCHLER

Demando

Kiu el la du sekvaj frazoj estas la ĝusta? *La patro vidis la infanon ŝtelanta panon en la vendejo. La patro vidis la infanon ŝtelantan panon en la vendejo.*

Respondo

Ambaŭ frazoj estas same ĝustaj, laŭ gramatika vidpunkto, sed ili havas malegalajn signifojn. La unua frazo

signifas, ke la patro vidis, ke la infano tiumomente ŝtelas panon. La dua frazo signifas, ke la patro vidis tiun infanon, kiu (eble kutime) ŝtelas panon; sed la patro ne nepre vidis, ke la infano tiumomente ŝtelas.

Supozeble la unua frazo estas ordinare pli utila, sed tio tute ne signifas, ke la dua estas erara. Por elekti inter la du, pripensu bone, kion vi intencas diri. ■

LA BLUA SONGÔ



J. M. Progiante



Autor: J. M. Progiante
Editora: Esprima, 2019
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro "La malbeno de Tarumo kaj Nurana" com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R\$ 39,00

EM VENDA EM  espresso.org.br/butiko

ZAMENHOFA TAGO 2019



Filmoklubo



Festlibro



Prelego



Kvizo



Kunfratiga lunĉo



Babilado

Festlibro
omaĝe al Sylla Chaves



Alex Cesário -

"Tiklaj aspektoj de la ĉefaj
esperantaj simboloj"

KIAM KAJ KIE?

La 14-an de decembro en la
sidejo de EASP ekde 15h.

Adreso:
Rua Faustolo, 172 - Lapa

Entra senpaga

Paroliga Rondo

Ĉiun sabaton matene
ekde marto 2020!

